

AMERIKA ESPERANTISTO
La Monata Bulteno de la Esperanta
Asocio de Norda Ameriko

Joseph R. Scherer, President
Los Angeles, California



AMERICAN ESPERANTIST
The Monthly Bulletin of the Esperanto
Association of North America

James F. Morton, Vice-Pres.
Paterson, N. J.

Joseph Leahy, Gen. Sec.
Central Office - 1517 H Street, N. W., Washington, D. C. - Central Office

Vol. 51, No. 3 - 10¢ per Copy -- Any Land -- \$ 1 per Year - January 1937.

* * * * * JULY ONE TWO and THREE, 1937 * * * * *
1887 - WASHINGTON - Urbo de la JUBILEA KONGRESO de ESPERANTO - 1937
* * * * * Kaj la TRIDEK KONGRESO de la E A N A * * * * *

VORTOJ DE LA PREZIDANTO

1937 - Jubilea Jaro! Ĉu ni haltigu nian spiradon dum momento? Ni havas kaŭzon! Ĉiu Esperantisto kiu legis eĉ nur la mallongan historion de la Esperanto-movado en ĝlosilo apenaŭ povis saluti la unuan tagon de 1937 sen haltigi la spiradon por kelkminuta pripensado.

Ni scias ke ni festos en Varsovio Jubilean Universalan Esperanto-Kongreson kaj en Washington nian 30-an naciian kongreson. Sed ili estas nur momentaj demonstracioj. Ni pensu iom pli profunde!

Jam dum 50 jaroj la cerba infano de Zamenhof vivis en la koroj de homoj. Hodiaŭ Esperanto estas parolata ĉirkaŭ la tuta mondo. La lingvo kaj la movado travivis multajn diversajn malsanojn kaj atakojn - kiel ĉiu alia infano, kaj kiel ĉiu alia ideo. Unue oni diris ke la infano ne vivos. Sed ĝi vivis - kaj nun ni jam certas ke ĝi ne mortos. Poste, kelkaj lingvodoktoroj volis operacii - unue la tutan nervan (gramatikan) sistemon, kaj poste eĉ la vizaĝon (la beĉecon) de la lingvo. Sed Esperanto travivis ĉiujn disputojn kaj nur hazarde, unuope venas de tempo al tempo iu malkontentulo kiu volas, tute nekompetente, plibeligi la nazon aŭ la orelojn. Samideanoj apenaŭ plu aŭskultas. Ili scias ke ekzistas tiom da diversaj ideoj, kiom estas kapoj.

Sed venis aliaj uraganoj! Mondmilitoj, malhelpado de "aŭtoritatuloj" kaj eĉ malpermesoj. Sed lingvo jam el la koro de homoj ne malaperas tiel facile. Same kiel aliaj malpermesitaj lingvoj Esperanto travivis, kaj hodiaŭ ricevas ĉiam pli kaj pli la rekonon de registaroj. Malpermeso en unu lando jam ne plu povas severe malhelpi - eĉ ne en la koncerna lando.

Sed Esperanto havas eĉ pli danĝerajn malamikojn - internajn. Estas la dormemuloj kaj la batalemuloj. La dormemuloj faras nenion. Ili nek propagandas, nek instruas, nek verkas, neniam helpas finance, eĉ ne legas gazetojn kaj ofte malkuraĝigas pli junajn semideanojn.

Same danĝeraj estas la batalemuloj. Ili ĉiam batalas inter si mem. Ili ne lernis, ke oni devas batali kun - ne kontraŭ aliaj samideanoj, eĉ se tiuj aliaj havas malsamajn ideojn en kelkaj aferoj. Feliĉe tiu ĉi malsano ne estas konata en la usona movado. Ni eĉ ne satas partopreni tro multe en internaciaj organizaj kaj misorganizaj disputoj. Tamen, ni faras nian devon; ni pagas la internaciajn kotizojn.

Nun la demando estas ĉu ni rajtas jubilei en 1937? Certe ni rajtas. Spite de organizaĵaj diskutoj, ni estas jam forta popolo; ni havas belegan internacian literaturon; ni havas la firman kredon, ke Esperanto, nun ne plu infano, sed jam matura ideo, povas kaj devas venki. Ni en Usono havas tute apartan kaŭzon por jubilei. Ni ĵus liberigis nin en nur 1½ jaroj de ombro kiu deposed kelkaj jaroj malfaciligis ĉiun kuragan propagandon. Ni povas do komenci la novan jaron kaj la novan duonjarcenton kun freŝa vento. La plej multaj el ni ne vidos la 100-jaron jubileon. Kiom niaj infanoj kaj nepoj povas festi - tio dependas grandparte de ni. Do kurage antaŭen!

(Nuntempa ie en Ĉeĥoslovakio)

Joseph R. Scherer.
Joseph R. Scherer.

A Word to the "Delegitoj" in the U.S.A. Considerable space was given in our November and December numbers to the organization of "Internacia Esperanto-Ligo" (IEL), and the circumstances which led both to that step and to the affiliation therewith of one after another among the Esperanto "landaj asocioj," -- our own EANA among the rest. Each issue of the weekly Heroldo de Esperanto contains a new list of those who have just established their status as delegitoj of IEL. One of the things needed by the International organization to insure a new era in Esperanto progress is individual members. (For membership fees, see last page) And another thing needed is a full and representative list of local representatives as "delegitoj." The 1936 Yearbook records such representatives under the old UEA organization in 53 towns and cities of the U.S.A. But individual action by these delegates themselves is needed to insure their continuance in such office, and the inclusion of their names in the 1937 Yearbook to be issued by IEL. They must individually have qualified as active members of IEL. And they must have signified their willingness to serve hereafter in the delegate's role. In places where there are groups of Esperantists, some form of election or choice is resorted to for insuring that the delegate's duties fall on those well qualified. May not our country take its place among the most wide awake departments of the Esperanto world in the number of localities where the international League thus has its local representatives?

The Ĉefdelegito for our country is Mr. Donald E. Parrish of Los Angeles, Calif. (New address 328 W. 46th St.) Arrangements may be made and information secured through him or the Central Office. Let the mail be heavy! Every locality should have a delegate. "What does one get out of it?" Your address in the Jarlibro goes around the world and brings to you correspondence from every quarter; so much information and world knowledge; so much pleasure and satisfaction, from the service they can give, that few, having tasted the experience, have any wish to resign. Hurry-IEL Director wishes to get the 1937 Jarlibro out as early as possible. Gesamideano! Ekagu senprokraste.

GRAMAFON-DISKOJ - D-ro Lehman Wendell, bone konata Esperanta verkisto kiu loĝas kaj laboras kiel dentisto en Minneapolis (en la Ŝtato Minnesota) skribis al samideano jene: "Antaŭ kelkaj samajnoj ses membroj de nia klubo faris gramafon-diskon. Ni sendos unu kopion al Sud-Ameriko, alian al Eŭropo, kaj trian al Japanujo. La disko, kiun ni sendis al Eŭropo vizitos ĉirkaŭ 80 urbojn."

JUBILEE PRIZE COMPETITION -- WATCH OUR FEBRUARY ISSUE.

A devoted Esperantist in the middle west has generously offered to give (anonymously) about twenty volumes of Esperanto literature out of his library to six readers of Amerika Esperantisto (within the continental United States) who shall present the most worthy short articles, all original -- in Esperanto and about Esperanto or the Esperanto-movado, according to terms which will be duly explained in our next number. The first prize will be for the best article, irrespective of the age of the competitor; the second will be for the best from a competitor below the age of thirty years; and the third will be for the best article from a competitor below the age of twenty years. Three other prizes will be awarded to the second best in the respective competitions. The present advance notice is given merely as an appetizer. Our February issue will announce the names of the books, and will give (in Esperanto) full details of the competition. We expect wide spread interest and participation. For even those who shall win no premiums will find adequate profits in the satisfaction and self-education of the competition itself.

UNITED STATES CAPITOL ESPERANTO CLASS. When the U. S. Congress opens, the Capitol Esperanto class will start its FOURTH ANNUAL session, under the leadership of Mr. Gerald F. Small, of the Navy Department, (class was formerly taught by Mr. H. B. Hastings). This class is the only instance known at either Central Offices of EANA or IEL, where an Esperanto class is conducted in a Nation's Legislative (Parliament) Halls. Every one is welcome.

9a. BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

De la 12-a ĝis la 17-a de novembro Ĉiujara okazis en Rio-de-Janeiro la 9a. Brazila Kongreso de Esperanto, sub la alta patronado de d-ro Getulio Vargas, Prezidanto de Brazilo. Estis ĝiaj Honoraj Prezidantoj s-ro Prezidanto de la Ĉambro de Deputitoj, ministroj de Eksterlandaj Aferoj, de Trafiko kaj Publikaj Laboroj kaj de Edukado, kaj la Urbestro de l' Federacia Distrikto. Ĝia Honora Komitato Konsistis el plej distingindaj nomoj, kiuj brilas en niaj rondoj literaturaj, sciencaj, administraj K. c.

Al tiu kunveno aliĝis preskaŭ 200 brasilaj Esperantistoj, du oficialaj Departementoj kaj 20 asocioj neesperantistaj; ankaŭ Prof. d-ro Odo Bujwid, kiu venis el Polujo speciale al tiu Kongreso, s-ro Pastro A. Stelacci, el Italujo, kaj Argentina Esperanto-Kolegio, funkcianta en Buenos-Aires. Dekunu prezidantoj de brazilaj Ŝtatoj kaj la Magistrato de l' Federacia Distrikto nomis siajn reprezentantojn: delegitoj de s-ro Urbestro de Rio-de-Janeiro ĉeestis la solenajn kunsidojn kaj salutis la Kongreson. La kongreso estis brilegaj kaj certe ĝiaj rezultatoj respondos al la klopodoj de l' Organiza Komitato, Granda estis la apogo, kiun ĝi ricevis de la brazila Registaro.

Iam antaŭ la kongreso s-ro ministro de Trafiko, D-ro Marques dos Reis, permesis al la prezidanto de B. L. E. senpage telegrafadi dum du monatoj pri la Kongreso al la tuta lando. La kunsidoj okazis ĉe Palaco Itamarari, t.e. ĉe la ministrejo de Eksterlandaj Aferoj, kies majesta salona por paroladoj kaj luksa biblioteko, - kiu estis farita ekspoziciejo de Esperantajoj - estis propramove disponigitaj de nia kanceliero, d-ro J. C. de Macedo Soares, la alnomata "Ambasadoro de la paco".

La malferma kunsido estis prezidita de konsulo d-ro J. Guimaraes Rosa, kiu reprezentis s-ron ministron. La ferman kunsidon tamen prezidis nia kanceliero mem. Faris belan paroladon la prezidanto de la kongreso, prof. E. Backheuser. Inter tiuj ĉi kunveno okazis alia, ankaŭ solena, memoriginta 30-an datrevenon de la deklaro de Esperanto kiel "lingvo klara" por la telegrafo en Brazilo, tiun kunsidon prezidis reprezentanto de s-ro ministro de Trafiko. Por ĉiuj solenaj kunsidoj la tablo, ĉe kiu sidis la estraro, estis kovrita per floroj havigitaj de tiu ministrejo mem kaj ornamita de flagoj brazila kaj Esperantista; inter tiuj ĉi staris busto de Zamenhof.

S-ro Macedo Soares ankaŭ proponis al la C. K. publikigon de ilustrita gvidlibro, en Esperanto, pri nia ĉefurbo, gvidlibro, kiu aperigus el la Ŝtata Presejo koste de tiu ministrejo; malgraŭ la proksimeco de l' Kongreso, tiu bela prospekto povis aperi, ĝuste antaŭ la fermo de nia kunveno. Ĉiuj presajoj, invitoj, programoj estis faritaj ĉe tiu oficiala presejo, sen ia elspezo de la kongreso mem.

S-ro ministro de Trafiko konsentis rabaton ja 50% al la kongresanoj venontaj el la Ŝtatoj per fervojo; eldonigis, dum la 9a Specimena Internacia Foiro de Rio-de-Janeiro, novan poŝtmarkon similan al tiu aperinta la pasintan jaron 1935, kun vortoj en la portugala lingvo kaj Esperanto kaj specialan poŝtmarkon memorigantan la 9-an Brazilan Kongreson de Esperanto. Ankaŭ poŝtagentejo funkciis en palaco Itamarari.

La malferman kunsidon komencis la himnoj brazila kaj Esperantista, kantitaj de bonega ĥoro el tridek voĉoj precipe virinaj, sur la direktado de majstro Barroso Netto. Faris la oficialan saluton d-ro Domingos Barboza, ĵurnalisto konstante verkanta artikolojn por Esperanto kaj reprezentanto de la prezidanto de Ŝtato Maranhão. El inter la salutoj ni menciuj tiujn de Prof-ro Bujwid kaj de nederlando samideano s-ro Marques do Couto, kiuj vere plaĉis al ĉiuj. Por fini ĉi tiun kunsidon, f-ino Maria Sabina deklamis la "Preĝon sub la Verda Standardo" kaj brazilan poeziaĵon. Ĉe la ferma kunsido Prof-ro Bujwid donacis al BLE fotografiaĵon, kie estas vidataj li kaj Zamenhof inter siaj universitataj kolegoj. Pro tiom da distingaj afablaĵoj de tiu klera pola kunbatalanto B.L.E. proponis, ke li estu konsiderata ĝia Honora Membro. La Kongreso finiĝis per kantado de brazilaj poeziaĵoj adaptitaj al muziko de Prof. Querino de Oliveira, kiu mem akompanis ĉe fortepiano la belegajn voĉojn de l' afablaj sinjorinoj.

(Apuda paĝo)

9a. BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO (Daŭrigita)

La kongreso ricevis multajn deziresprimojn, salutojn kaj apogvoĉojn eĉ de la Deputitaraj Ĉambroj Federacia kaj de Ŝtatoj Rio-de-Janeiro kaj Rio Grande do Norte; ankaŭ dekoj da telegramoj kaj leteroj, eĉ el eksterlando, estis adresitaj al nia kunveno.

S-ro d-ro Thadeu Grabowski, ministro de Polujo en Brazilo, bonvolis akcepti la gekongresanojn por tetrinkado ĉe la legacio; la invitoj al tiu kunveno estis redaktitaj kaj presitaj en Esperanto; ĉe tiu pola hejmo la invititoj estis salutitaj de s-ro sekretario, en Esperanto.

La katolikaj Esperantistoj aŭdis meson, dum kiu estis kantita la "Ave-Maria" en Esperanto kaj pastro d-ro Felício Magaldi faris alparolon pri la lingvo internacia.

Notinda estas ankaŭ traduko-konkurso starigita de BLE kaj subtenita de multŝatata revuo "O Malho".

Estis organizitaj pluraj ekskursoj, inter kiuj al moneto Pao de Acúcar, al kies supro oni iras per kablo-vojo, kaj al la 9a Internacia. Specimena Foiro, kiu publikigis sian regularon ankaŭ en Esperanto.

Dum la laborkunsidoj estis elektita la nova estraro de BLE, kies ĝistiam prezidanto d-ro A. Couto Fernandes estis rekondukita al tiu sama posteno kaj akceptita, kun ĝenerala aplaŭdado, kiel dumviva prezidanto de tiu ligo.

Grava estis ankaŭ la kunsido, dum kiu oni pritraktis la temon pri la nova internacia organizo. La ĝenerala-sekretario de BLE prof. d-ro Porto Careiro Neto, detale sciigis la ĉeestantojn pri la nuna situacio de la tutmonda movado kaj petis plej zorgan konsideradon pri tiel delikata afero. Prof-ro Bujwid, alestinta en Eŭropo diskutojn pri tio faritajn, bonvolis pliklarigi la demandojn. Ĉe tiel konvinkaj argumentoj kaj antaŭ la fakta situacio, la kongreso decidis, ke BLE aliĝu al la ĵus fondita Internacia Esperanto-Ligo, en Londono.

CAN WE BE FORGIVEN? - In 'congrats' to "our friends in Congress" last month, somehow the name of "Sen. Fletcher" was used when it should have been "Senator Morris Shepherd" (Texas). Our apologies to the Senator, the state of Texas, and the various constituents, who were quick to notice - and notify. Again we congratulate Senator Morris Shepherd.

Samideanoj: - Esperantisto-fraŭlo serĉas nepezan laboron en ŝtato prefere apud oceano. Bonvolu serĉi la memoron kaj amikaron por ablecoj. Post 33-jara loĝado kaj 23-jara instruado en Akron, li deziras pangajni per alia metodo se eble kun via afabla helpo. Fama prelegisto eŭropa diris ke lia laboro estas tre granda servo al la movado. Por detaloj pri li leteru: -
Fenton Stancliff, 1106 Big - Falls Avenue, Akron, Ohio.

KONGRESO LIBRO - a splendid souvenir of the 29th EAŬA Congress, 28 pages.....25¢
(many are putting this book in their Club and City Libraries)

"La Regno de l'Vero", Fabelo Por Grandaj Homoj - translated from the Russian by Albert M. Koliner, with foreword by Dr. Tobias Sigel.....20¢

GOSPELS - Sts. Mark and John, 5¢ each. "La Karto Mistera" - tre intriga.....20¢

Our World - touring President, Joseph R. Scherer has a very interesting article entitled "Unu lingvo por travojaĝi la mondo" in the "Austrian Esperantist" re. the efficiency of Esperanto for the traveler. He says: "Each discontented tourist, who has language difficulties in a foreign land, is a step towards enmity and a new war", and glowingly explains the opposite results with a knowledge of Esperanto.

CLASS ACTIVITIES - The Esperanto Club of the Technological College, Lubbock, Texas will hold their meetings - and classes - every week, instead of twice-a-month as formerly - the more folks know about nia afero the oftener they want to get together.

Houston Esperanto Association announces classes each Saturday - 5:30 p.m. in the YWCA, under direction of Miss Frances Love and Mr. William H. Lockhart of Rice Institute, and Mr. J. Frank Summers of Houston University. Other hard workers in the Association are: Miss Lucy Love, Miss Clara Louise Saner, Mr. Ross King and Mr. M. Rudy, son of the internationally known philologist, Dr. A. Rudy - personally known to many Washington, D. C., Esperantists.

SCRANTON, Pa - Andreo I. Rogus moved to Scranton only a few months ago, looked around, and proceeded to improve the Esperanto situation. With the aid of Episcopo J. Misiaszeh, who made announcements at his Church services, a class of 14 has been started - with good prospects of increased interest in Nia Afero.

NORTH AMERICAN ESPERANTISTS WILL HOLD THEIR THIRTIETH ANNUAL CONGRESS IN WASHINGTON, D. C., JULY 1, 2, 3, 1937. On this occasion they will also celebrate the 50th YEAR since the WORLD AUXILIARY LANGUAGE ESPERANTO WAS PRESENTED TO THE PEOPLE BY DR. L. L. ZAMENHOF. THIS GOLDEN JUBILEE OF THE ESPERANTO MOVEMENT will be celebrated in every country on the globe. Every one interested in Esperanto will want to be known, in the years to follow, as a participant in the GOLDEN JUBILEE OF ESPERANTO. BE READY!

CONGRESS COMMITTEE - Chairman, Mrs. C. J. Walter; Secretary, Mr. Kenneth F. Rogers; Treasurer, Miss Kathleen Prutz. Other committee members will be listed in next issue.

AN EASY COURSE IN ESPERANTO, by Karl Froding, latest edition just out, is a great improvement over former editions. It has a 4 page vocabulary, besides the short vocabularies in each lesson. Eight lessons, in 24 pages and stiff cover. Price 10¢. The Central Office can supply demands.

NEKROLOGO. Ree estas nia malĝoja tasko por diri al la Esperantistaro ke alia el niaj amataj anoj forlasis nin por iri al la ejo de la eterna ripozo. La 23-an de Novembro mortis en Detroit, Michigan (Usono), Doktoro Tobias Sigel, en la aĝo de 74 jaroj, kiu pli ol tridek jaroj senlace laboradis por nia afero. Li gvidis grupojn, instruadis Esperanton kaj partoprenis en ĉiuj kunvenoj kaj festoj en lia regiono. Li estis unu el la mondaj nobeluloj. Lia plej granda ambicio estis por fari feliĉajn siajn kunhomojn. Sube ŝajne maldelikata ekstero li portadis KORON de ORO. Ĉiuj alilandaj vizitantoj al Detroit estis gastigitaj kaj regalitaj je la bonkora doktoro. La memoro pri tiu vigla kaj sindona pachtalanto restos ĉiam en la koroj de ĉiuj kiu lin konis. Mi esprimas al la familio kaj liaj grupanoj sincerajn kondolencojn.

We regret very much, the news of the passing of Dr. Tobias reached us too late for publication in the December issue.

ZAMENHOF BIRTHDAY CELEBRATIONS. It would be a great pleasure to give in detail the various programs that have been sent in (press clippings, letters, etc.) BUT - space limits.

DETROIT, Mich., - The Esperanto Society of Detroit, celebration consisted of a dinner, Dec. 13, followed by vocal and instrumental music, and talks on Esperanto and its author, also giving special honor to the memory of the late Dr. Tobias Sigel, honorary president of the society, who was an unselfish, tireless and persistent exponent of Nia Afero for over thirty years, the beloved of all who were fortunate enough to have known him - Nature's nobleman, with a heart of gold.

CLEVELAND HEIGHTS, Ohio. The Esperanto Association of Cleveland held a dinner meeting at the YWCA Dec. 20th, to celebrate Zamenhof Day. In appreciation for favors received from the Cleveland Public Library, a book on the Life of Dr. Zamenhof was presented to a Library representative. Between forty and fifty were in attendance -

all paying especial tribute, also to the memory of the late beloved Dr. Sigel, of Detroit. Twenty five members of the Cleveland Heights High School Esperanto Club are corresponding with samideanoj of almost as many foreign lands - bubbling with enthusiasm over the great opportunities for world information afforded by a knowledge of la kara lingvo.

DORCHESTER, Mass. - At the Zamenhof Festival held Dec. 13, an address by Mr. H. B. Hastings of Boston (until recently of Washington) and a demonstration lesson of the Cseh method by Miss Roan U. Orloff of Boston, was enjoyed by a number of the community's best citizens.

LITTLE ROCK, Ark. - A splendid program was carried out by the Esperanto Rondo, of songs, music, speeches and dinner, under the able supervision of their secretary, F-ino A. Moulton. Others taking part were - S-inoj F. A. Post, Marie Wittenberg, S-roj F. A. Post, E. E. Upton and Pastro J. B. Hunter, Christian Church. After dinner the following officers were elected: President, F. A. Post-nikov; Vice Pres., L. Gouldman; Librarian, F-ino Sue Marie Van Frank; Committee members:- S-ino H. F. Post-nikov, F-ino E. Van Frank, and S-ro E. E. Upton.

Washington, D. C. - Zamenhof Birthday was celebrated Dec. 15th, with music, songs and speeches - E. G. Dodge, in English and Hirsch Ginn, in Esperanto; Music, Violin and Cello, Rudolph Heman; Harmonica, J. N. Garner; Songs - English, Mrs. Etta Morrell; Esperanto, Mrs. Emilie Baker; Piano accompanist, Mrs. Steward. Miss Kathleen A. Prutz (President of Bonegularo) Committee.

WASHINGTON, D. C. Chapter at their meeting Dec. 22 elected the following officers for the coming year:- President, Ernest G. Dodge; Vice-President, Miss Kathleen A. Prutz; Secretary, Hugh L. Shatford; Treasurer, Miss Mabel G. Hamilton -- last two were reelected. Mrs. Clara J. Walter the outgoing President, read a full, and very interesting report of the chapter activities during 1936.

50 YEAR JUBILEE of ESPERANTO CONGRESS will be held in Warsaw, Poland, August 7 - 14 1937. The congress committees are making great efforts to have this congress eclipse everything that has gone before. They are sending a beautiful poster, size about 30x40, green background, black and white letters, to delegates all over the world.

MISS MARTHA ROOT, Bahai-Esperanto-Journalist-World Traveller, addressed a full house in the Bahai Hall, Sunday (20th Dec.). Many Esperantists attended, and were amply rewarded, by a splendid, instructive and informative talk on her meetings with world rulers and other 'higher ups', and their reactions to her Esperanto and Bahai interviews. Like all world travellers, who know Esperanto, she enthuses over the great advantage it is to the traveller - time and money saver.

REGARDLESS of war all around them, the Esperanto papers are coming out regularly, from Barcelona and Valencia - all war news.

FOR SALE. "Brush-up" course in German on five double-faced records, with album and printed text. Excellent condition, \$ 7.50, or will trade for used set of records in Esperanto. Oliver J. Lillevoid, R #1, Prairie Farm, Wisconsin.

THE POPULAR SCIENCE BI-MONTHLY "SCIENCA GAZETO" is now receiving subscriptions for its sixth year, 1937. There will be two important improvements in the paper for next year. Price per year: \$ 1.00. Sample copy Free. American Esperanto Institute, 1111 Brooke Road, Rockford, Illinois.

"EL VERDAVALO" - in 3 parts, each containing 6 very interesting personal experience stories from the South Sea Islands, by S-ro R. F. Vaughn, Borneo, who has spent many years in that part of the world 18¢ each.

ĈIAM PORTU LA VERDAN STELON - La Verda Stelo, La Magia Slosilo al Homaj Koroj-Esperanto Emblemo en Butontruo. Ĉiu Eoha Esperantisto Fiere Ĝin Portus. Verda stelo kun ora "E", kaj ora protekto sur stelpunktoj. Elekto-Ŝtraŭbo....40¢. Sava Pinglo.....50¢. VI ATENTIGOS LA PUBLIKON PRI ESPERANTO kaj LA SAMIDEANOJN PRI VI MEM. - Any Esperantist or friend of Esperanto.

"A Picture is Worth 1000 Words" - Postage stamp type and size - Photographs, gummed, ready to stick, from any picture. 100 for \$ 1.00, 500 for \$ 4.00, 1000 for \$ 7.00. Original returned unharmed. For birthday, gift, graduation - all kinds of greeting cards. Gem Photos - - 1 1/4 x 2 1/4 - 25 for \$ 1.00 or 50 for \$ 1.50 Dr. Zamenhof - 5 x 7, 25¢ -- 5 for \$1; 8 x 10, 65¢ Postcard, 10¢ 3 for 25¢ - Gems.

EVERY ESPERANTIST SHOULD BE A MEMBER OF E.A.N.A. - AND BRING IN A NEW MEMBER.
Membership Rates

M -- EANA and IEL, with "American Esperantist" \$ 1.50
MJ - EANA - IEL, with "American Esperantist" and Jarlibro 2.50
MA - EANA and IEL, with (Jarlibro) and Esperanto Internacia (Monthly) . . . 4.00
MAH- All of the above (except "Esp.Int.") and weekly "Heroldo de Esperanto". 6.50
MS - EANA-IEL-Jarlibro, may receive both Weekly and Monthly publications, or may elect to receive instead of the Weekly "Heroldo de Esperanto" a selection of book premiums from an already published list - - - - ask for it - - - - \$ 3.50
The Jarlibro (Yearbook) is a directory of Esperanto Delegates in all parts of the world, the various Esperanto organizations and publications, and all sorts of information necessary to any one wishing to "BE UP" on Esperanto affairs.

TEXTBOOKS: "Practical Grammar" by Dr. Ivy-Kellerman Reed, member of the World Language Committee. A course suitable for all grades - has no superior. The most popular textbook on the American Market 75¢

FRODING'S "Easy Course in Esperanto" - a splendid 'starter' of 8 lessons 10¢

SUSSMUTH'S "American Esperanto Key" - Grammar and Vocabulary 5¢

"EDINBURGH POCKET DICTIONARY" 288 pages, size 4 x 6, indispensable to any Esperantist you will want one eventually - G E T I T N O W \$ 1.00

MILLIDGE Esperanto-English Dictionary,....\$2.75 and Rhode's English Esperanto. \$ 1.10
A combination that is unbeatable - - - - - only a few Rhode's left.

Easy - and interesting reading: "Fabloj de Ezopo"...25¢ "Zamenhofa Ligolibro"...50¢
"Sub la Meznokta Suno"..... 25¢ Versajetoj.....25¢ "Sep Ridoj".....25¢
"Facilaj Esperantaj Legaĵoj".....50¢ La Vojo Returne (Remarque).....\$2.00
"Akrobato de Nia Sinjorino (Payson)..25¢ Esperanto por la Blinduloj.....5¢
Blanche, Virgulino de Lille (Payson) 25¢ Unu-Bileto (Edogano).....25¢
Dua Kreanto, Poemo.....10¢ Deveno de Esperanto L.L. Zamenhof.....10¢
Infanmurdo (Japanese drama).....25¢ "Ĝinevra" (Privat).....25¢
Juneco kaj Amo (Boards) 35¢ (Paper)..25¢ "Miserere kaj Thais" (Payson).....25¢
Lando de Arĝenta Akvo (Roe-Payson)...15¢ Radio Manuelo.....25¢
Mopso de la Onklo (Chase).....15¢ Jos. Rhoses "Early Days of Esperanto
Princo Vanco (Putman kaj Beetes).....35¢ in England". (Esperanto).....75¢
Roĵujo Ĉiumiljara (Wagnallis-Payson).35¢ Surprises at Sylvia Farm(H.W. Fisher).10¢
Rakonto kaj Aventuro (Hall-Barcoll)..15¢ Baha'u'llah kaj la Nova Epoko.....1.25
Taso de Amservo (Taylor-Weems).....35¢ "Piramo kaj Tizbeo" (W. G. Adams)...10¢
"Guide to Esperanto" (former price 25¢.....15¢ -- This book is for self-
instruction, class use, and correspondence work, as well as to guide the Esperantist
in the study, teaching, use and propoganda of Esperanto. Only a few left--HURRY!!!
Fundamento de Ispografio by Fred A. Hamann.....55¢ - La baza libro de ISPO aŭ
Internacia Steno-Pazigrafio, kiu signifas internacia mallongskribo por Ĉiuj kaj estas
intencata farigi la dua skribo por Ĉiuj, simile al Esp-o, la dua lingvo por Ĉiuj.
Guide to English Ispography (For acquiring speed).....60¢
Slosilo de Esperanta Ispografio.....10¢ Key to English Ispography.....10¢
Schlüssel der deutschen Ispographie....10¢ Clave de Ispografia Española.....10¢
Correspondence Course in Ispo, including books..... \$2.00

Esperanto Association of North America - - - 1517 H Street, N. W. Washington, D. C.